Ĝeneralaj informoj

Antaŭpago: Por ĉiu persono 50 eŭroj.

Aliĝdato: Ni kalkulos laŭ la alvendato de la aliĝo papera aŭ retpoŝta, se la aliĝanto ĝis la limdato forsendas la antaŭpagon. La aliĝo validas nur post alveno de la antaŭpago kaj post nia konfirmo.

Malaliĝo ĝis la 30-a de oktobro: Repago de via kompleta aliĝkotizo sen subtraho. Malaliĝo ĝis la 15-a de decembro: Subtraho de 30 eŭroj. Poste/neanoncita nealveno: Neniu repago de la aliĝkotizo; eventuale necesos pagi kostojn de la domo. Ni vin tre petas informi pri eventuala neveno por eviti senutilajn elspezojn. Transdono al alia persono: Neniu subtraho; pagendas laŭ la nova aĝokategorio, tamen minimume la sama sumo kiel la unua aliĝinto.

Kontoj: N-ro 2596 58-301, EsperantoLand e. V., ĉe "Postbank Hannover" (germana banka kodo 250 100 30; internacia kontonumero - IBAN: DE07 2501 0030 0259 6583 01, internacia banka kodo - BIC: PBNK DE FF), indiku "NIS". Konto eold-g, EsperantoLand, ĉe Flandra Esperanto-Ligo kaj same ĉe Universala Esperanto-Asocio. Eblas antaŭpagi per sendado de ĉeko aŭ eŭro-monbiletoj (je risko de la sendanto) al nia suba adreso.

Rabato por programkontribuantoj kaj helpantoj laŭ interkonsento.

Sendu vian aliĝilon al EsperantoLand e. V., Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, 2. Gartenhaus, 10551 Berlin, Germanio, lu.esperanto@gmx.de, tel. +49-30-685 58 31, telekopiilo +49-30-68 05 70 11, http://www.esperantoland.org/nis

---

Kiom da personoj manĝos vegetare__/ne gravas__/nevegetare__?

O Mi/ni ŝatus loĝi en tri-/kvarpersona ĉambro.
O Mi/ni ŝatus loĝi en dupersona, O en unupersona ĉambro.
O kun aparta banejo
Via ebla kontribuo al la programo/rimarkoj:

O Vi rajtas mencii mian nomon sur la NIS-retpaĝoj.

Mi antaŭpagos 50 eŭrojn por ĉiu aliĝinto.
Dato Subskribo

NIS

Festi novjare en Germanio

2011-12-27 ĝis 2012-01-03

3-a Novjara Internacia Semajno por junuloj kaj junaj plenkreskuloj

la speciala programo de la Novjara Renkontiĝo (NR)

Bitburg (iom norde de Trier/Treviro), Germanio
- apud Luksemburgio kaj Belgio -

Por la kreskigo de Esperantujo

www.EsperantoLand.org

Festi novjare en Germanio

La unua "Novjara Internacia Semajno" (NIS) por junuloj kaj junaj plenkreskuloj same kiel la dua okazis en Saarbrücken. Ĉi-foje ni invitas vin al Bitburg (apud Trier/Treviro). Dum la du unuaj NIS-oj partoprenis proksimume kvardeko da junuloj kaj junaj plenkreskuloj.

Ni planas plu establi tiun renkontiĝon ĉe la okcidenta limo de Germanio – eble iam ankaŭ en najbara lando. NIS okazos en la sama domo kiel la jam tradicia Novjara Renkontiĝo (NR); ni rezervos ĉambrojn kaj kunvenejojn en du koridoroj por la NIS-anoj por plifaciligi la kunestadon.

Internacia partoprenantaro

Dum la du unuaj kunvenoj la partoprenantoj de la "Novjara Internacia Semajno" (NIS) venis plejparte el eksterlando, kio kreis bele internacian etoson.

Libertempo kaj amuzo, diskoteko kaj filmoj

En la programo denove estos diskoteko, koncertoj kaj certe komuna ludado; pliaj programeroj aldoniĝos. Estos ankaŭ kelkaj "seriozaj" programeroj kiel prelegoj, diskutrondoj, laborgrupoj kaj lingvokursoj kun konversacio. Feliĉe la domo disponas pri aparta kinosalono, kie oni facile povos projekcii filmojn. Eblos kompreneble ankaŭ partopreni en la cetera NR-programo kun diversaj prelegoj kaj aliaj ofertoj.

Renkontiĝejo en Eifel-regiono

La urbeto Bitburg troviĝas ĉ. 30 km norde de Trier/Treviro, en la Eifel-regiono kaj do estas tre proksima el la najbaraj Luksemburgio, Belgio kaj ankaŭ Francio kaj Nederlando. La renkontiĝejo troviĝas en urboparto iom ekster la urbo, ĉ. kvar kilometrojn for de la centro.

Tranoktado

La ĉambroj disponas pri apudaj duŝo kaj necesejo, por po du dormĉambroj; kelkaj du- kaj unupersonaj havas propran banejon. Por junuloj kaj junaj plenkreskuloj (ĝis 27 jaroj) la indikita prezo estas por kvarpersona ĉambro.

Lerni aŭ plulerni Esperanton kaj tuj apliki ĝin

Ni ofertos kurson por komencantoj en la unuaj du tagoj de la aranĝo (28a kaj 29a de dec.); estos daŭriga kurso kaj konversacio por progresantoj. Tiel eblos en unu renkontiĝo eklerni la lingvon kaj tuj apliki ĝin en internacia rondo.

Ĉu vi interesiĝas?

Tiam plenigu la paperan aliĝilon aŭ la retan ĉe http://www.esperantoland.org/nis

Plena kotizo (7 tagoj; en eŭroj)

Aliĝo ĝis	1-a de majo	3-a de julio	2-a de okt.	11-a de dec.	poste
11 ĝis 17	185				
18 ĝis 27	186	200	207	221	235
ekde 28 j.	221	235	242	256	270

(Aĝo je la komenco de la renkontiĝo)

La kotizo inkluzivas la manĝojn kaj la tranoktadon, la programon (sen la ekskursoj) kaj la silvestran feston kun bufedo. La baza kotizo validas por kvarpersona junula ĉambro kun duŝo kaj necesejo.
Aldono por **dupersona ĉambro:** 70 eŭroj por 7 tagoj
Aldono por **unupersona ĉambro:** 140 eŭroj por 7 tagoj
Aldono por **aparta banejo** por la ĉambro: 35 eŭroj por 7 tagoj
Rabato por **eksterlande loĝantaj homoj:** 14 eŭroj por 7 tagoj

---

Aliĝu al NIS!

Mi/ni aliĝas kiel plenpaganto(j).
Partopreno: 2011-12-27 ĝis 2012-01-03 aŭ aliaj datoj:_____

Persona nomo, familia nomo	viro/virino	naskiĝdato

Adreso, lando:

Telefono: _____ Telekopiilo: _____
Retpoŝta adreso (tre legeble!): _____